

Kantotrezoro

de Erik Tantal



Kantotrezoro

Erik Tantal
2026

Enhavo

Antaŭparolo.....	5
Sensenca babilado.....	6
Festo-kanto.....	7
Niaj bestoj.....	8
Printempo.....	10
En vilaĝo.....	11
Malkuraĝa ne estu.....	12
Ne zorgu.....	13
Mi lernas ĉiam.....	15
Mia poŝtelefono.....	16
Ni kantas laŭte.....	18
Paco, nun revenu.....	18
Nuboj alte en ĉiel'.....	19
La amo-vorto.....	20
Dancu nun.....	22
Pluvombrelo danc'.....	23
Vigla melodio.....	25
Dimanĉa kant'.....	26
Lulkanto.....	27
Persisto.....	29
Freud & Einstein.....	30
Sendormeco.....	32
Sur la kanapo.....	33
Kolofono.....	35

Antaŭparolo

Skribi kantotekstojn estas amuze! Estas eĉ pli amuze kiam oni kantas ilin mem. Bedaŭrinde, mi ne estas bona kantisto. Tial mi donis miajn kantotekstojn al la artefarita inteligenteco ĉe 'suno.com'. Kaj poste mi ricevis belajn melodiojn kun kantado.

La muziko estas prezentita ĉe ĉi tiu adreso:

suno.com/@japa2025

Elektu la kantliston 'Playlist Erik T.'

Tie vi ankaŭ trovos multajn kantojn en aliaj lingvoj: la germana, la angla, la korea, kaj eĉ unu kanton en la platgermana. La francan kanton kontribuis esperanto-parolantino el Francio.

Bonan legadon kaj aŭskultadon!

Erik Tantal

Sensenca babilado

Ĉiu babiladas nur, ne nur en la dom',
Kvieto ĉie mankas, zumas telefon'.
Senfinaj stultaj frazoj flugas tra l' aer'.
Eĉ en politiko gravas la afer'.

Babilado! Malagrabra bru'.
Babilado! Vortoj sen influ'.

Demandu vian estron: Pli da mono nun!
Li ne volas aŭdi vin. Sekvas aĉa pun'.
Pli da ĉikanado nun, sed ne plu da mon'.
Tion vi eltenu. Iru sen bombon'.

Babilado! Malagrabra bru'.
Babilado! Vortoj sen influ'.

Babilas amikin' en aŭto kaj en dom'.
Kvieto ne plu estas, restas la fantom'.
Neniam estos ŝanĝ', sed malesperu ne!
Batalu ĝis la venk', penu forte tre!

Babilado! Malagrabra bru'.
Babilado! Vortoj sen influ'.

Ĉiu babiladas nur, ne nur en la dom',
Kvieto ĉie mankas, zumas telefon'.
Neniam estos ŝanĝ', sed malesperu ne!
Batalu ĝis la venk', penu forte tre!

Festo-kanto

Ĉiu homo, ĉiu besto
ĝojas pri feliĉa festo.
Ĉiu knabo kaj knabino
ne plu restas en la nesto.

Estas kekso, estas kuko,
ankaŭ suko vere plaĉas vin.
Ĉiu manĝas, ĉiu trinkas,
kaj onklino ŝminkas sin.

Ĉiu kantas, eĉ la bebo,
nun sen larmoj, ĝi ne ploras,
ĝi baraktas, kaj balbutas,
la muzikon ŝatas ĝi.

Estas ŝercoj, estas ĝojo.
Ĉiu ridas pro feliĉo.
Kaj la knabo kun knabino
dancas sen la mandolin'.

Avo dancas kun avino
dum vespero ĝis la fin'

Avo dancas kun avino
dum vespero ĝis la fin'

Niaj bestoj

Ĝi manĝas, ĝi manĝas,
malgranda elefant'.
Ĝi trinkas, ĝi trinkas,
ĝi ŝmacas sen demand'.
Bananoj kun karotosuk'
gustumas sen kompar'.
Terpomoj kun tomatosup',
festeno kun nektar'.

Jes tiaj estas niaj bestoj,
amikoj sur la ter'.

Gi hopas, ĝi hopas,
kuniklo sur herbar'.
Ĝi krablas, ĝi krablas,
senbrue en arbar'.
Susuras nur la foliaĵ,
pepetas la paser'.
Enombre kuŝas erinac',
ĝi dormas sen danĝer'.

Jes tiaj estas niaj bestoj,
amikoj sur la ter'.

Ĝi dancas, ĝi dancas,
girafo laŭ muzik'.
Turniĝas, turniĝas,

la ĝusta gimnastik'.
Petolas ĝi kun granda ĝoj',
kreskadas la plezur'.
Svingiĝas nur la longa kol',
postulo de l' natur'.

Jes tiaj estas niaj bestoj,
amikoj sur la ter'.

Ĝi naĝas, ĝi naĝas,
Delfeno en la mar'.
Ĝi saltas, ĝi saltas,
super ondoj sen kompar'
Ĝi estas vera akrobat'
Ja, ĉiu ŝatas ĝin.
Sen naĝvestaĵ kaj sen kravat'
Mirinda estas la fascin'.

Jes tiaj estas niaj bestoj,
amikoj sur la ter'.
Jes tiaj estas niaj bestoj,
ankaŭ en maro kaj river'.

Printempo

Nun floras la pomarbo.
La vintro estas for.
Printempa freŝa farbo.
Printempa flor-odor'.

Varmaj sunradioj tuŝas
vian haŭton kun abund'.
En la mola herb' vi kuŝas.
Ĝoju pri ĉiu sekund'.

Alvenas la printemp'.
Alvenas la printemp'.

Herbejoj sin ornamas
kun flavaj florbuked'.
Abeloj sumas, flugas.
Bongustas florbufed'.

Senĉese pepas birdoj nun.
Belega prezent'.
Ne estas nuboj, nur la sun'.
Printempa firmament'.

La merlo trilas en ĝarden'.
Minaco kontraŭ la rival'.
La heĝo estas la kurten'.
Transflugi ĝin estus skandal'.

Alvenas la printemp'.
Alvenas la printemp'.

Nun floras la pomarbo.
La vintro estas for.
Printempa freŝa farbo.
Printempa flor-odor'.

Alvenas la printemp'.
Agrabla flor-odor'.

En vilaĝo

En vilaĝo sur la strato
mi kaptas ŝin nur per l' okul'.
Jen reago, per korbato. Kia feliĉa dolĉul'.
Ĉu morgaŭ, ĉu baldaŭ?
Kiu scias, kiam.
Vin revidos mi - i - i - i - ? Gravas ja nur tiu ŝanc'.

Longajn tagojn, longajn noktojn
forestas vi, kia sufer'!
Senpacience mi sopiras. Mankas ja mia suker'.

Ĉu morgaŭ, ĉu baldaŭ?
Kiu scias, kiam.
Vin revidos mi - i - i - i - ? Aperus ja nur via ĉarm'.

Frumatene post sunleviĝo
mi vidas ŝin ĵus sur la strat'.
Sed ne sole – man-en-mane - kune kun vira amat'.

Ĉu morgaŭ, ĉu baldaŭ?
Certe mi scias, kiam.
Vin forgesos mi - i - i - i - !
Ne estas ja tro granda dram'.

En vilaĝo sur la strato
Ne estas ja tro granda dram'.

Malkuraĝa ne estu

Ho ve, kien foriris
ĉiuj jaroj nur?
Tion ankaŭ longe sciis
iu fama trobador',
kiu multe verkis lirike,
kaj ofte kantis kritike.

Malkuraĝa tial ne estu.
Malgraŭ la aĝo, juna restu!

Nur kvindekjara vi ĝojas.
Bicikli ŝatas vi,
trankvile vi biciklas,
sed knabo timigas vin.

"Foriru, avo!", li vokas,
senhonte li ridaĉas.

Malkuraĝa tial ne estu.
Malgraŭ la aĝo, juna restu!

Poste, post du jaroj,
migradas vi sen ĉap'.
"Vi havas grizajn harojn!",
mokado pri la kap'.
Konfirmas tion la spegul':
jes, vi estas maljunul'.

Malkuraĝa tial ne estu.
Malgraŭ la aĝo, juna restu!
Kun sepdek venas ĝojo.
Vi rampas al la bus'.
Ne estas la unua fojo,
ĝi ekveturas ĵus.
Marŝu malgraŭ la dolor',
ne plu pensu pri l' ŝofor'!

Malkuraĝa tial ne estu.
Malgraŭ la aĝo, juna restu!

Ne zorgu

(Laŭ Mateo 6:25-29)

Je-su-o diras al ni:

Ne zorgu pri via vivo,
nek pri tio, kion vi manĝos.
Ne zorgu pri via trinko,
nek pri viaj vestoj.

Ĉu ne pli valoras la vivo ol nutraĵo?
Ĉu ne pli la korpo ol vestaĵo?
Rigardu la birdojn de l' ĉielo:
ili ne semas nek rikoltas,
kaj tamen la Patro ilin nutras.
Ili ne semas nek rikoltas,
kaj tamen la Patro ilin nutras.
Se Dio prizorgas la birdojn,
kiom pli Li zorgos pri vi?

Rigardu la liliojn en la kampo:
Ili ne laboras nek ŝpinas,
sed ili brilas en belega vest'.
Ili ne laboras nek ŝpinas,
sed ili brilas en belega vest'.

Eĉ Salomono, en sia glor',
ne estis tiel vestita.
Do kial vi zorgu, ho malfortuloj?
Ĉu ne pli valoras la korpo ol vestaĵo?

Ho Sinjoro, konduku nin!

Al la vera vivo, al lumo brila!
Donu al ni la akvon de l' vivo,
por ke ni neniam plu so-i-fu.

Konduku nin, ho Jesuo!
Konduku nin al la lum'!

Konduku nin al la lum'!

Mi lernas ĉiam

Mi lernas ĉiam kun plezur',
plezuron havas mi.
Tial mi volas lerni nur.
Ĉu vere ankaŭ vi?
Se vi kaj mi eklernu nun
ne gravas la erar'.
Ne estos pluvo, nur la sun',
nur ĝojo sen kompar'.
Venu lernu ankaŭ vi. Venu lernu nur kun mi!

Mi iras ĉiam tra l'natur'.
Naturon ŝatas mi.
Tie mi volas vivi nur.
Ĉu vere ankaŭ vi?

Se vi kaj mi promenu nun
tra kampoj kaj arbar'.

Ripozo estas sur la dun',
plezuro ĉe la mar'.

Venu vivu ankaŭ vi. Venu vivu nur kun mi!

Mi serĉas ĉiam kun bravur',
bravuron havas mi.
Kie la am' troviĝas nur?
Ĉu ankaŭ serĉas vi?

Se vi kaj mi kunvivu nun,
ne nur kiel najbar'.
Ne estos nuboj, nur la lum'
kaj amo por la par'.

Venu amu ankaŭ vi. Venu amu nur kun mi!

Mia poŝtelefono

Silento sen poŝtelefono,
ĉar ĝi estas mia krono.
Dum laboro kaj ripoz',
vivas ĝi en simbioz'.

Silento sen poŝtelefono,
ĉar ĝi estas mia krono.

Kial nomiĝas ĝi „Handy“?

Tion scias nia Sandy.
Estas ilo por la man' –
sen ĝi mankas ĉiu plan'.

Si-lento sen poŝtelefono,
ĉar ĝi estas mia krono.

Kelkaj diras: „Jen saĝfon'!“
Ĉar ĝi pensas kun fason'.
Saĝa estas ankaŭ „app“,
ĉar per ĝi tre brilas kap'.
Silento sen poŝtelefono,
ĉar ĝi estas mia krono.

Ĉiu „app“ ja estas reĝo,
kiel vintro dum la neĝ'.

Kaj ĉe tablo aŭ sur seĝo –
direktoro en manĝo'.
Silento sen poŝtelefono,
ĉar ĝi estas mia krono.

Ne marŝadu kun la nuko
kiel simio en la luko.
Rigardu supren al ĉiel' –
ne nur obstine al tunel'!
De tempo al tempo haltu ĝin –
jen do bona telefonabstin'!

Ni kantas laŭte

Ni laŭdas Dion kune ni.
Ni kantas laŭte ne nur mi.
Ni dankas Dion, ankaŭ vi.

Ni volas kanti kune.
Komencu spiri zume.
Plenigu korojn per la ĝoj'.
Ni eĉ lamentas kune ni.
Ni petas Dion, helpu nin!
Ni preĝas kaj petegas ni.

Ni volas kanti kune.
Komencu spiri zume.
Plenigu korojn per la ĝoj'.

Funebbras ni, konsolu nin!
Suferas ni, protektu nin!
Je Dio firme kredas ni.

Ni volas kanti kune.
Komencu flustri zume.
Plenigu korojn per la ĝoj'.

Paco, nun revenu

Nuboj alte en ĉiel'
flugas trans la limojn,

flugas trans la limojn.
Ankaŭ birdo kaj anĝel'
zorgas ne pri la bariloj.
Eĉ la sun' kondutas tiel
brilas pli ol la kandel'.
[instrumental interlude]
Nur la homoj kreas murojn,
vivo en malamikec',
faras krimojn kaj torturojn,
Sed por pats' mankas firmec'.

Por armiloj estas mon'.
Propagando unison'.
Malamik' - iĝas demon'.

Komenciĝu la milit'.
Komenciĝu la milit'.
Suferoj, mortoj kaj profit',
Funebro, larmoj sen limit'.
Tamen daŭras la milit'.

Nuboj alte en ĉiel'

flugas trans la limojn,
flugas trans la limojn.
Ankaŭ birdo kaj anĝel'
ne zorgas pri bariloj.
Eĉ la sun' kondutas tiel

brilas pli ol la kandel'.
Nur pardono montras vojon,
por la savo el infer'.
Ni malligu nun la nodon.
Liberiĝo de l'mizer'.
Ĉiuj baroj malaperas.
Eĉ foriĝas la malam'.

Paco povas komenciĝi.
Paco, nun revenu!

Paco povas komenciĝi.
Paco, nun revenu!

Nuboj alte en ĉiel'
flugas trans la limojn,
flugas trans la limojn.

Paco, nun revenu!

La amo-vorto

La franca vort' estas l'amour,
trovebla en literatur'.
La Angloj simple diras love,
facile skribas stenograf'.

Love kaj - l'amour -, la aventur'.

Vi nur bezonas tiun vorton
en ĉiuj lingvoj de la mond'.
Bone influu vian sorton.
Vi mirus baldaŭ pri l' respond'.
Amo kreas ja amon'.
Koreoj flustras nur sarang,
ĉar tiu vort' ne estas slang'.
Láska, ĉeĥa la esprim',
sed diru tion nur sen tim'.

Sarang kaj Laska, sama rang'.

Forgesu ne, ke en Kenio,
en ĉiuj lokoj de la land',
mapenzi estas ĉiam ĉio.
Pri tio mankas la demand'.

Mapenzi, - fantazi', - la poezi'.

Pliajn ekzemplojn serĉu mem.
Hungaroj vokas szerelem.
Prononco estas la problem'.

Szerelem, la ĝusta tem'.

Franclingva vort' estas l'amour,
trovebla en literatur'.

Vi nur bezonas tiun vorton
en ĉiuj lingvoj de la mond'.

Bone influu vian sorton.
Vi mirus baldaŭ pri l' respond'.
Tiam vi baldaŭ estos du, la vera amo-kontribu'.
Kaj Esperanto helpas plu.

Dancu nun

Dancu nun. dancu nun. Dancu laŭ muziko.
Venu nun. Venu nun. Estas bona ŝanc'.
Venu nun. Venu nun. Bona gimnastiko.
Dancu nun. dancu nun. Estas bela danc'.

Dancu kun mi.

Simple en salono. Tie ĉe kamen'.
Seĝon ni forpuŝu. For kun la kusen'!
Nur per etaj paŝoj. Simpla la afer'.
Dancu ni nun ronde. Ne estas danĝer'.

Dancu nun. dancu nun. Dancu laŭ muziko.
Venu nun. Venu nun. Estas bona ŝanc'.

Simple nur la movo estas bona sport'.
Bona por muskoloj, por la tuta korp'.
Portu ĝustajn ŝuojn, dancu sen dolor'.
Sekvu nun la ritmon, ĉarma amator'.

Dancu kun mi.

Sekvu min. Sekvu min. Levu viajn krurojn.

Sekvu min. Sekvu min. dancu nun sen tim'

Lernu ni la valson, tri-kvarona takt'.
Tango venas poste, danco kun kontakt'.
Valsi estas turni, turnu nun vin mem.
Turnu vin en tsirklo, ne estas problem'.

Dancu nun. dancu nun. dancu laŭ muziko.
Venu nun. Venu nun. Estas bona ŝanc'.
Venu nun. Venu nun. Bona gimnastiko.
Dancu nun. dancu nun. Estas bela danc'

Dancu kun mi.

Sekvu min. Sekvu min.
Dancu nun sen tim'.

Pluvombrela danc'

Pluvombrela danc',
turniĝas vi en tranc'.

Pluvogutoj falas nun,
larmoj de la sun'.
Dum la nokto de la lun',
por ombrelo la fortun'.

Pluvombrela kant',

jen akvo por la plant'.
jen akvo por la plant'.

Pluvogutoj plaĉas nur.
Bone por natur',
dum la tag' malseka ŝpur',
por ombrelo la plezur'.

Pluvombrela trot',
malsekas jam kulot'.
malsekas jam kulot'.

Pluvogutoj sen kompar',
flakoj kiel mar'.
Ĉie sur la trotuar',
por ombrelo la nektar'.

Pluvombrel' en vent',
malbona akcident'.
malbona akcident'.

Teni ĝin ne eblas nun.
Blovo de tajfun'.
Ankaŭ mankas ja la sun'.
Por ombrelo estas pun'.

Pluvogutoj sur vizaĝ'.
Estas nur domaĝ'.
Estas nur domaĝ'.

Vigla melodio

Lasu sunon brili
kie ajn vi estas nur.
Lasu botojn marŝi.
Eku nun, per ĉiu krur'.

Vent' kaj nuboj sen potenc',
malproksime kuŝas senc'.
Prenu dorsosakon,
nur kantaro en la poŝ'.
Postlasu tabakon.
Estas grava ĉiu groŝ'.

Liberec', freŝa a-er'
helpas kontraŭ la mizer'.

Sunradioj brilas en la kor',
la feliĉo ne plu estas for.
Sunradioj helaj, kun varmec',
sunradioj, la ĉiela pec'.

Grizaj nuboj estu for.
Freŝa vent' estu motor'.

El mallumo al la lum'.
Decidemo, bona fid',
sur ĉapel' la bunta plum'.

Grizaj nuboj estu for.
Freŝa vent' estu motor'.

Dimanĉa kant'

Ĉiu tag' estas ĉagreno.
Sed dimanĉo en mateno,
ĉiuj zorgoj malaperis.
Dio ilin nun forigis.
Ĉiuj zorgoj malaperis.
Dio ilin nun forigis.

Ek al danko, ek al kanto.
La dimanĉo estas festo-tag'.
El la turo la komando.
Sonoriloj kun muzik'.

El la turo la komando.
Sonoriloj kun muzik'.

Ĉiu tago, nova ŝanco.
Kio estas la bilanco?
Ĉu kontenta? Ĉu sobriga?
Ĉiufoje la surpriz'.

Ĉu kontenta? Ĉu sobriga?
Ĉiufoje la surpriz'.

Sed dimanĉo je mateno,
en preĵejo la haveno.
La diservo komenciĝas.
Silentiĝas sonoril'.
La diservo komenciĝas.
Silentiĝas sonoril'.

Ek al danko, ek al kanto.
La dimanĉo estas festo-tag'.
Trankviliĝu, nun aŭskultu.
Refreŝigo por anim'.

Mi promesas, mi revenos.
Bonas la dimanĉa kant'.

Mi promesas, mi revenos.
Bonas la dimanĉa kant'.

Lulkanto

Dolĉe dormas jam la sun,
nun montriĝas lun'.
Ĉiu stelo en ĉiel',
estas nun juvel'.

Estas nun juvel',
belas la ĉiel'.
Dolĉe dormu nun,

Dolĉe sonĝas la marmot',
sonĝas pri karot'.
Kuŝas ĉarme en kavern',
lumo de l' lantern'.

Lumo de l' lantern',
por marmot': kavern'.
Dolĉe sonĝas ĝi,
ankaŭ sonĝu vi.

Dolĉe paŭzas pluv' kaj vent',
patse en konsent'.
Ĉiu kuŝas en trankvil',
krom la krokodil'.

Krom la krokodil',
ronkas dum trankvil'.
Dolĉa la bruet',

Dolĉe dormas jam la sun,
nun montriĝas lun'.
Ĉiu stelo en ĉiel',
estas nun juvel'.

Estas nun juvel', belas la ĉiel'.
Dolĉe dormu nun, ankaŭ dormas sun'.

Persisto

Maljuna, saĝa viro
havas mesaĝon por vi.
Fidu lin, junulo,
la vivon konas li.

Restu ĝis la lasta fino,
sen hezito kaj sen timo.
Venko estu via sino,
ĉampiono, ne viktimo.

La ŝlosilo de sukceso
estu ĉiam la persisto.
Bona estu la progreso,
plaĉa por la optimisto.

Li kontraŭstaris multon,
kaj ĝojon kaj doloron.
Aŭskultu lian voĉon,
parolas el la koro.

Restu ĝis la lasta fino,
sen hezito kaj sen timo.
Venko estu via sino,
ĉampiono, ne viktimo.

La ŝlosilo de sukceso
estu ĉiam la persisto.

Bona estu la progreso,
plaĉa por la optimisto.

Ridu vi en ĉiu horo,
eĉ en mondo de sufero.
Via stoika humoro
estu lumo en mallumo.

Triumfas persistemo
super ĉiu ajn problemo.

Freud & Einstein

Dek okcent kvindek sesa jar',
naskiĝis Freud por la homar'.
Dek okcent sepdek naŭa jaro,
venis Einstein kun tondraro.

Sigmund Freud esploras sonĝon,
Albert Einstein spacan plonĝon.
Ĉu estas nur teori'?'
Aŭ ĉu estas blafemi'?

Respondekas la neŭronoj
sur la subkonsciaj tronoj.

Sigmund Freud esploras sonĝon,
Albert Einstein spacan plonĝon.

Kian strukturon havas la tempo?
Demandu la majstron de la momento!
Aŭ demandu profundpsikologon,
vi tute ne bezonas la drogon.
Ĉio estas nur materio,
traŭmato en la viv-serio.

Sigmund Freud esploras sonĝon,
Albert Einstein spacan plonĝon.

Spac' kaj tempo kunfandiĝas,
kiu povas tion kompreni?
Via cerbo nun meandras,
lasu la pensojn nur promeni.

Sonĝo gardas vian dormon,
kontraŭagas ĉiun ŝtormon.

Sigmund Freud esploras sonĝon,
Albert Einstein spacan plonĝon.

Ĉu vi sciis: inter si
korespondis ili en harmoni'?
Pri la paco, pri homrealeco,
por forigi la malamikecon.

Kial milito? La grava temo,
por la homaro – ĝusta skemo.
Sigmund Freud esploras sonĝon,

Albert Einstein spacan plonĝon.

La malamo, la psikozo,
batalu kontraŭ ili per fort'!
Vivi, morti kun neŭrozo,
estas ja tre malbona sort'.

Vi bezonas fantazion,
scio ne savos la nacion.

Sigmund Freud esploras sonĝon,
Albert Einstein spacan plonĝon.

Sendormeco

Je la tria nokta hor'
Maltrankvilo en la kor'
Kvankam lito estas preta,
mi ja estas tute veka.

Sendormeco en la nokt',
Sendormeco en la nokt'.

Suhr la flanko, suhr la ventro,
ĉiam regas dormo-manko.

Endormiĝi mi ne povas,
kiu kuracilon trovas?

Rampas temp' kiel heliko,
por mi restas nur turmento.
Sendormeco en la nokt',
Sendormeco en la nokt'.

Kial mi ne povas dormi?
Kiu volas min prisorĉi?

Sendormeco estas plago,
kiam venos nova tago?

Tiam ja rapidas temp'
kiel flugo de la vent'.

Sur la kanapo

Ki-e la plej bona lok'
por ripozo en la dom'?
Ĉi-e mankas plaĉa rok'
Tion serĉas ĉiu hom'.

Kanapo donas la komforton
ĉar malŝatas mi la sporton.
Ĉar mi estas ja bradipo,
vere pigra prototipo.

Kanapon ŝatas mi.
Bradipo estas mi.

Ĉi tie estas sinergi'
por mamul' sen energi'.

Bradipo estas mi.

Mi simple kuŝas kiel pigra sak',
ŝtopita estas la stomak'.
Bradipo pigras nun.
Ne estas malfortun'.
Bradipo pigras nun.
Ne estas malfortun'.

Bradipo pigras nun.

Sed dum kuŝado granda ŝok'!
Tro kurta la kanap'
por mi eĉ sen la kap'.
Terura la afer'
Sufer'.
Terura la afer'
Sufer'.

Tamen la plej bona lok'
estas kanapo, mia rok'.

Bone por la bradipo.
Estas klara klarigo.

Kolofono

Titolo

Kantotrezoro

Versio 1.0

1-a Eldono, 2026, E-libro

Aŭtoro

Erik Tantal, alinome Klaus Frieze

Kopirajto

© Klaus Frieze, Hamburg

Retpoŝto

frieze@esperanto-hamburg.de

Hejmpaĝo

esperanto-klaus.de

Kovrilo

ChatGPT



suno.com/@japa2025
Playlist Erik T.



esperanto-klaus.de

